

James Yorkston,
Molly Malone

tradukita de Manfred Retzlaff

1. Hier in diesem Städtchen,
Da lebte ein Mädchen,
Zum ersten Mal hab' ich mich damals ver-
liebt.
Ihren Karren durch Straßen
Sie schob und durch Gassen
Und rief laut : Kauft Muscheln, kauft Au-
stern! Kommt, Leute, kauft doch !
Kommt, Leute, kauft Muscheln! Kommt,
Leute, kauft Muscheln !
Und rief laut : Kommt Leute! Kauft Mu-
scheln! Ist alles noch frisch!

2. So ist sie vor Jahren
Durch Dublin gefahren,
So wie es auch einst ihre Eltern getan.
Sie zogen durch Straßen
Und auch durch die Gassen,
Und riefen : Kauft Muscheln, kauft Au-
stern! Kommt, Leute, kauft doch !
Kommt, Leute, kauft Muscheln! Kommt,
Leute, kauft Muscheln !
Und riefen : Kommt Leute,! Kauft Mu-
scheln! Ist alles noch frisch!

3. Sie starb dann am Fieber
Ist lange vorüber ;
Doch denke ich immer noch, immer noch
dran,
Wie sie schob ihren Wagen,
Mit Muscheln beladen,
Und rief laut : Kauft Muscheln, kauft Au-
stern! Kommt, Leute, kauft doch
Kommt, Leute, kauft Muscheln ! Kommt,
Leute, kauft Muscheln !
Und rief laut : Kommt Leute,! Kauft Mu-
scheln! Ist alles noch frisch!

...

James Yorkston,
Molly Malone

*tradukita de Jean-Marc
Leclercq*

En bela Dublino,
kie ravas la ino,
Ekvidis dolĉegan mi
Molly Malone.
Ŝi travagis stratarojn
puŝante la varojn.
"Kardioj! Mituloj!
Aĉetu de mi!"
Ho freŝajn kardiojn,
Ho vivajn mitulojn,
Moluskojn vivegajn
proponas mi!

Estis ŝi vendistino,
sed ne miris Dublino,
Ĉar ankaŭ tiel faris ge-
patroj de ŝi.
Ili vagis stratarojn,
puŝante la varojn,
"Kardioj! Mituloj!
Aĉetu de mi!"
Ho freŝajn kardiojn,
Ho vivajn mitulojn,
Moluskojn vivegajn
proponas mi!

Jen febro ekfortis,
pro tio ŝi mortis,
La fino alvenis al Molly
Malone.
Fantomo nun vagas,
neniu nun pagas
Por kardioj, miltuloj
puŝataj de ĝi.
Fantomajn kardiojn
Fantomajn mitulojn,
Fantomajn moluskojn
nur vendas nun ĝi.

...

James Yorkston,
Moliino Malon'

*tradukita de Manfredo Ra-
tislavo*

1. En bela Dublino,
Jen vivis knabino,
Enamiĝis unue en tiun ĉi
mi.
Ĉareton ŝovante
Tra l' stratoj irante
Ŝi vokis : Jen konkoj, jen
ostroj! Aĉetu vi, ho!
Ankoraŭ tutfreŝaj, anko-
raŭ tutfreŝaj!
Jen konkoj kaj ostroj!
Aĉetu vi, ho!

2. Veturis ŝi tiel
Tra l' stratoj samkiel
Ĝin faris antaŭe gepatroj
de ŝi.
Sian ĉaron ŝovante,
Tra l' stratoj irante
Vokante : Jen konkoj, jen
ostroj! Aĉetu vi, ho!
Ankoraŭ tutfreŝaj, anko-
raŭ tutfreŝaj!
Jen konkoj kaj ostroj!
Aĉetu vi, ho!

3. Ŝi iĝis malsana,
Sanig' estis vana,
Memoras mi ĉiam ankoraŭ
pri ŝi,
Tra l' stratoj iranta,
Ĉareton ŝovanta,
Vokanta: Jen konkoj, jen
ostroj! Aĉetu vi, ho!
Ankoraŭ tutfreŝaj, anko-
raŭ tutfreŝaj!
Jen konkoj kaj ostroj!
Aĉetu vi, ho!

...

*Traduko de la Angla poemo "Molly Malone" de James Yorkston en la Germanan de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2006-12-04.*

MR-451-2 (deutsch) / Arg-374-734 (2008-11-29 16:22:08)

*Traduko de la Angla poemo "Molly Malone" de James Yorkston en Esperanton de JEAN-MARC LECLERCQ (*1961-10-10).*

Arg-374-1886 (2013-11-25 11:01:43)

*Traduko de la Angla poemo "Molly Malone" de James Yorkston en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2006-12-04.*

MR-451-2 (Esperanto) / Arg-374-735 (2008-11-29 16:14:27)